

Heinrich Heine,
Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, VII

tradukita de Manfred Retzlaff

Sur la monto la kastelo
En la Rejn' spegulas sin;
Mia ŝipo en sunhelo
Sur la akvo portas min.²

Moviĝantaj sub la vento
Brilas ondoj kiel or',
Ekvekiĝas en mi sento
Ripozinta en la kor'.

Feliĉige salutante
Logas for mi la river';
Sed mi scias: minacante
Loĝas en ĝi mort-danĝer'.

Supre estis ĝi ĝojiga
Kiel mia anatin',
Sed interne tre timiga,
Kun malico en la sin'.

...

²aŭ:
En la Rejno speguliĝas
Sur la monto la kastel'
Gaje mia ŝip' moviĝas
En la brila suna hel'.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, VII" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983.*

MR-138-1 / Arg-708-1424 (2012-12-07 19:46:15)